

THE BRITISH ESPERANTIST

OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)

ISSUED ON THE 24TH OF EACH MONTH.

SUPPLIED TO MEMBERS ONLY.

Vol. XXVI—No. 304.

AUGUST, 1930.

THE
BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION
(INCORPORATED).

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Telephone: Holborn 4794.

Telegrams: "Esperanto", Westcent, London.

Late Hon. President: DR. L. L. ZAMENHOF.

Hon. President: J. M. WARDEN.

President: JOHN MERCHANT.

Hon. Vice-Presidents: G. D. BUCHANAN, MISS E. A. LAWRENCE.

Vice-Presidents: J. J. BOUTWOOD, J.P., PROF. W.

E. COLLINSON, M.A., Ph.D., W. M. PAGE, S.S.C.

Hon. Secretary: ROBERT ROBERTSON.

Hon. Treasurer: PAUL BLAISE.

Secretary: MONTAGU C. BUTLER, L.R.A.M.

Business Manager: CECIL C. GOLDSMITH, F.C.I.

Office Hours: 9—5.30. (Monday till 8.30, Saturday till 12.30).

The Association consists of Fellows, Members, Affiliated Groups, and Federations. The Annual Subscriptions are:—Fellows, 21s.; Members, 5/-; Junior Members (under 18), 2s. 6d.; Life Fellowship, £12 : 12 : 0 Life Membership £5.

A list of Affiliated Federations and Groups will be sent on application. Group Affiliation fee: 6d. per member per annum; minimum, 5/-.

This Official Organ is sent each month to Fellows and Members.

"INTERNATIONAL LANGUAGE."—A monthly magazine in English, devoted to the study of the International Language problem. Includes instructional articles on Esperanto and *The Esperanto Student*, a supplement for beginners. Subscription, 2/6 per annum, post free.

YOUR MANUSCRIPT.

Every keen Esperantist feels the urge to authorship, whether of a translation or of an original work, though distrust of one's powers usually stifles these literary aspirations, and it is not easy to get the help of candid and unbiassed criticism by competent friends. But what if one's work could be submitted—under a "nom de plume" if desired—to the kindly, constructive criticism of one, or several, of the most expert Esperantists of the country? The B.E.A. Literary Service provides exactly that opportunity. It is hoped that many students will take advantage of the facilities now offered — all the more because in this connection every worthy exercise of individual ability involves a corresponding potential gain to the Esperanto movement generally. A wide field is open to the *literaturisto*, and apart from the author's own delight in the achievement of artistic self-expression, every piece of good literature is a valuable contribution to the welfare of our movement. The way to mastery in craftsmanship is not easy, but it is smoothed considerably when the aspirant has the advantage of really expert assistance.

METHOD.—Esperantists are invited to submit their manuscripts, long or short, for criticism by acknowledged experts in the language. The criticism in every case will be constructive. Where necessary, suggestions will be offered

bearing upon the development of literary ability. It is obvious that in the case of technical manuscripts criticism of **subject matter** cannot be offered. It is essential that work submitted should be typed, or should at least be written **very clearly**. Ample space should be left, by a wide margin, or by ample space between the lines, for correction, comment, or suggestion. Right is reserved to decline to consider any work received, if, on account of illegibility, obviously insufficient knowledge of the language, or any other reason, it is deemed unsuitable.

FEE.—The work submitted may be poetry or prose, translated or original. In case of translations, a copy of the original also should be sent if possible. Manuscripts should be addressed to *B.E.A. Literary Service, 142, High Holborn, London, W.C. 1*, and should be accompanied by the prescribed fee, calculated at the rate of five shillings per thousand words, with a minimum fee of half a crown. Postage for the return of the manuscript should also be included in every case.

NOTES.—(1) The experts of the Literary Service are glad to offer the help of their *linguistic* abilities by way of comment and criticism, but recognise the inexpediency of attempting to change any literary form which is what it is because of an inspirational constraint. (2) The Literary Service is not intended to give the official "imprimatur" of the B.E.A. to any

manuscript. Authors should clearly understand that in event of the publication of any manuscript after examination by the Literary Service tutors, no mention must be made of the B.E.A. in connection with it.

LETTER FROM Dr. ZAMENHOF.

Among the papers of the late Mr. A. J. Adams was found the following postcard. Mr. Adams had sent Zamenhof a card, on one side of which was printed "La Preĝo sub la Verda Standardo," and on the other a translation in English verse. He received this reply. --

Varsovio
str. Dzika No. 9.

1/1/06.

Kara Sinjoro,

Kun plezuro mi ricevis vian belan karton kun mia versaĵo kaj ĝia angla traduko. Mi dankas vin kore. La poemo enhavas mian tutan kredon kaj esperon, kaj mi vidas kun plezuro ke ĝi plaĉis al vi kaj vi ĝin disvastigas.

Via
L. ZAMENHOF.

B.E.A. DIARY, 1931.

We are now preparing this for the printers. Many towns and villages are still without a Local Representative, and in order to make the diary as useful as possible we should like to fill up some of these gaps before we go to press. If there is no Local Representative for your locality, and you are willing to serve, please let us know without delay, when particulars will be sent you. In view of the interest which will be aroused by the Congress, this matter is of special importance.

ESPERANTO HOLIDAY IN ITALY (Aug. 26th—Sept. 3rd).

This will be an enjoyable holiday under exceptional conditions. Comfortable travel—good hotels—Esperanto-speaking guides—the Italian Esperanto Congress, and other attractions. Lugano, Capolago, Brunate, Milan, Lake Maggiore, and other places of interest, will be visited. Price, including accommodation, meals, tips, amusements, guide-books, and 2nd-class travel from London and back, £12:15:0. Members travel outwards together, but can return at any time within one month. Reduced fare vouchers from the provinces. The party is open to B.E.A. members only. Payment may be made by £1 deposit, the balance by August 20th. Particulars from the B.E.A. BOOK AT ONCE!

OOSTDUINKIRK.

Denove aro da Britaj Esperantistoj vizitis Oostduinkirkon, kaj ĝuis memorindan libertempon (Julio 5-12).

Ĉeestis nur 20, ĉar sendube la Oksforda Kongreso forlogis multajn ĉeestuntojn. Denove kelkaj Flandraj samideanoj tendis apude sur la dunoj; krom tio, logis en la hotelo ankaŭ du membroj de la Belga Ligo. La tuta aro bone sin amuzis per kuna kantado de Esperantaj kaj naciaj kantoj, dancado, kaj banado. Oni faris viziton al Nieupoort kaj Bruges, kie la lokaj samideanoj ricevis la partion kun vere frata amikeco. Sinceran dankon al S-ro Appleby, kiu bonege gvidis kaj amuzis la karavanon, ankaŭ al la hotelestro, S-ro Benoit, mem Esperantisto, kiu multege laboris, por ke ĉiu estu komforta kaj feliĉa.

22-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Oxford, 2-9 Aŭgusto, 1930.

La aranĝoj bone progresas, kaj la antaŭsignoj estas tre favoraj. Plenaj detaloj troviĝas en *International Language*, la oficiala organo de la Kongreso.

MOVADO FEDERACIA.

Lancashire kaj Cheshire. La kunvenon de 5 Julio en Longridge ĉeestis 70. Prezidis Prof. Collinson, kiu aludis la konsenton de la Universitato Liverpool starigi Esperantan prelegaron. Oni donis al Cyril Turner premion de vizito al la Oksforda Kongreso, pro lia progreso en Esperanto ĉe la lernejo William Stockton, Ellesmere Port. Duan premion gajnis Stanley Callis. Poste Pastro Morgan kondukis partion por monta vagado. Proksima kunveno, frue en Oktobro, kredeble en Burnley.

Southern. Proksima kunveno en Gosport, 13 Sept. Ankaŭ Diservo ĉe Albert Road, Southsea, 14 Sept.

South Wales. Sukcesa kunveno ĉe Barry Island, 29 Junio, kiam ĉeestis ankaŭ sep Cheltenhamanoj, inter kiuj S-roj Appleby kaj Yates. Posttagmeze tridek membroj el Merthyr, Bridgend, Newport, Cardiff, kaj Barry, vagadis ĝis la marbordo, kaj post grimpadon sur la klifoj finis feliĉan tagon per temanĝo kaj kantado.

South Western. Sekretario (nova adreso): R. W. J. Norton, 68 The Broadway, Cowick Lane, Exeter.

West Midland. Kunveno okazos en Banbury, je Sabato, 20 Septembro. Biletoj 1/3. Oni proponas ankaŭ kunvenojn por la Dimanĉo, se sufiĉe multaj ĉeestos.

MOVADO GRUPA, KURSA, LOKA.

Al Instruistoj. Ni aparte petas detalojn pri publikaj kursoj por presigo en la venonta numero. Sendu detalojn laŭ jena ordo: Nomo kaj adreso de institucio; aŭspicioj; aĝo aŭ sekso de lernantoj; pago; instruisto; tago, dato, kaj horo, de unua leciono; grado de instruo (elementa, meza, supera).

Alton. Kurso malfermiĝos sub aŭspicioj de la League of Nations' Union. Instruos: S-ro E. F. Gray, Assisi, Kings Road.

Barry. Ĉiudusemajne oni vaĝadas en la kamparo.

Birmingham. Nova Sekretario: L. Flint, "Mirador," Parade, Hall Green.

Burton. Kurso okazas ĉiuvendrede ĉe Kafejo Alexandria, Station Street.

Dover. Nova Sekretario: S-ro A. Cockfield, 155 Clarendon Street, Dover.

Dundee. Kunvenoj merkrede en "La Moderna Kafejo," Wellgate. Vagadoj: 9 Aŭgusto, per vagonaro 2.10 al Arbroath, 2/1. 20 Aŭgusto, Renkonto ĉe Monifieth Stacidomo je 7.45 p.t.m. Ĉeestontoj sendu karton al F-ino Marnie, 7 Park Avenue.

Aranĝoj por la Skota Kongreso de 5-7 Septembro bone progresas. Jam aligis 40. Oni atendas S-ron Merchant. Por plena programo kaj aligilo skribu al S-ro Graham Paton, 62 Forthill Drive, Broughty Ferry.

Edinburgh. Vagado 16 Aŭgusto de Kirkliston al Queensferry laŭ Dundas Castle. Renkontejo: Waverley Bridge, 2.5.

London Club (170 Fleet Street, 8.0). Aŭg. 1, Akcepto al kongresanoj. 5, Intima babilado. 8, Postkongresa kunveno. 12, Adiaŭ. 15, Visto (1/-). 19 Io bela el la Nordo. 22, Esperanto and the Press. 26, La Kongreso en Oxford. 29, Gazeta vespero.

London, Acton. Ĉe la Kooperista Festo de 5 Julio, *Internacia Tago*, la grupo Brentham aranĝis budon kaj vendis literaturon. Multaj el la 20,000 ĉeestantoj faris demandojn kaj montris intereson. Tial, ke la Tago estas afero ĉiujara, kun festoj en multaj urboj tra la mondo, ni rekomendas al aliaj grupoj tiun ekzemplon.

London, North. (Broadway Cafe, New Southgate). Aŭg. 5, Arangota de la Prezidantino. 12, Post-Oksforda Fremdul-vespero. 19, Gramofona vespero. 26, Kantoj.

Partick. Nova Sekretario: John Harvey, 21 Burgh Hall Street, Partick, Glasgow, W.1.

Sheffield. La loka grupo kunvenis seninterrompe jam 24 jarojn. Kunvenoj ĉiudusemajne, marde, ĉe W.E.A. House, Western Bank. La grupon nun vivigas nova sango el lastjaraj kursoj. Somere okazas vagadoj. Meznombra ĉeesto, 18.

MOVADO FAKA.

Fakaj kunvenoj ĉe la Oksforda Kongreso. *Lunde*: 2.30, Novspirita, Policista, Bahaa, Scienca, Romkatolika; 3.30, Lingva Komitato; 4.30, Blindula. *Marde*: 2.30, Instruista, Pacifista, Stenografista, Legantoj de Heroldo, Oomota; 4.0, Framasona. *Merkrede*: 2.30, Scienca. Kristana, Amikoj al la Bestoj, I.L.E.P.T.O., Paneŭropa, Virina; 4.0, Farmacia.

Edukada: Modern Languages (June, 1930) skribas pri la broŝureto *Esperanto in the School*: "We have received quite a remarkable pamphlet on the place of Esperanto in modern language teaching, and should have liked to notice it at some length." Do, kial ne?

W.E.A. kursoj okazis en Londono, 1929-30, ĉe Battersea, Fulham, Hackney, Hammersmith, Harrow, Hornsey, Islington, Willesden, kaj Wood Green.

Fervoja. En *Railway Service Journal* de Junio oni raportas, ke unu parolado ĉe la R.C.A. Konferenco fariĝis en Esperanto.

Filatela. Ni ricevis N-ron 3 de *Filatelisto Adresaro*, dumonata organo de poŝtmark-kolektantoj. Prezo por 6 numeroj: 2s, ĉe Jablonne n. Orl., Ĉeĥoslovakujo.

Skolta. Ni ĝojas revidi *Skolta Heroldo*, kies eldono momente interrompiĝis. De nun ĝi aperos ĉiutrimonate, Jarabono: 15 fr. fk., ĉe Pastro G. Ramboux, 22 Cours Albert 1, Paris, VIII. Rabataj prezoj por 25-100 numeroj. La gazeto estas bone redaktita kaj tre subteninda.

EDZIĜO.

Norton - Hawkins. S-ro R. W. J. Norton, kun F-ino Gladys E. Hawkins, ambaŭ el Exeter, 5 Julio, 1930. Adreso: 68 The Broadway, Cowick Lane, Exeter.

Bagnall - Lawe. Je 24 Julio, J. S. Bagnall, vicprezidanto de E.M.E.F., kun F-ino M. Lawe; ambaŭ Esperantistoj en Mansfield.

ORA EDZIĜO.

Marriott - Firth. Je 14 Julio, 1880, en Hulme, Manchester, S-ro Rhodes Marriott, kun F-ino Sarah E Firth, Adreso: 10 Hartington Road, Buxton.

MORTO.

Hooper. Je 11 Junio, S-ro H. H. Hooper, Craig Dhu, Northwood Rd., Tankerton. S-ro Hooper estis malnova Esperantisto, kaj membro de B.E.A.

VARIOUS.

Divine Service in Esperanto will be held in St. Botolph's Church, Bishopsgate, E.C. 2., at 3.15, on Sunday, 10th Aŭgust, when the speaker will be M. C. Butler, and the singer, Miss Cosmetto. At the same day and hour a Roman Catholic service with sermon in

Esperanto will be held at St. Etheldreda's, Ely Place, E.C. 1.

As the monthly tea and meeting of the Duadimanĉa Rondo will take place during Post-Congress days, this will be a special opportunity for rest, music, conversation, and a few short speeches. The Rondo therefore invites to tea at the Great Eastern Hotel visitors to either of these services.

Postkongreso en Londono. The Secretary of the Postkongreso, Mr. R. E. Fry, 1 Swaby Road, S.W. 18, will send full details of arrangements on application.

"Esperanto Kiboŝa." This new Esperanto magazine has 4697 subscribers in the first three months, and expects to have 30,000 by the end of the year. Abonkosto: 2s. Eldonejo: Kiboŝa, 458 Niŝiookubo, Tokio, Japanujo.

More House-names! *Nia Hejmo* (Topsham), *Belvido* (Grimsby), *Nia Belrevo* (Grimsby), *Bonvenu* (Holton-le-Clay).

Chocolates. Messrs. Cadbury are now supplying their "Esperanto" chocolates to all confectioners at the usual rates (minimum quantity 3lb). See that your local confectioner stocks them.

Beaumont Street School, Huddersfield. Ges. Holmes afable pagas premie por la plej progresinta lernanto en tiu lernejo la elspezon de aliĝo al la Oksforda Kongreso.

Photographs of the Nottingham Congress may be obtained for 6d, 1/8, or 3/6, from J. Coulson, 42 Bevoir Rd., Coalville, Leicestershire.

Hanta Melodio. La nomo de la piana solo aludita en nia lastnumera raporto pri la Kongreso en Nottingham estas "Preludo en C diesa," kaj la verkinto estas la solisto mem: S-ro T. Gordon Briggs.

Lessons in Braille. *The School Magazine*, a Braille monthly published by the Norwood Institute for the Blind, contains lessons in Esperanto as a special 4-page supplement.

VERKOJ RICEVITAJ.

La Langue Internationale. (Ĉe que tout militant ouvrier doit connaître de la question), E. Lanty, 80 pp., 3.50 fr. fr. Franclingva propaganda libreto de S.A.T. vidpunkto. Bonege verkita, kaj tute rekomendinda por sia celo.

***The Workers' Esperanto Movement.** Translated from the Esperanto by H. Stay. 29 pp., 6p. An English translation of the above work.

Sur la Feliciĵo. R. E. Bossiere, Trad. C. Meunier, H. Dubuisson, J. Guillaume, kaj E. Chicot. 40pp., 5 fr. fr., ĉe C. Meunier, 65 Rue Thiers, Le Havre, Francujo. Ŝajne propono, sub la formo de fabelo, por solvo feliciĉa de la problemoj financaj lasitaj de la milito. Bedaŭrinde, pro pezeco de ŝtilo kaj lingvaj kritikindaĵoj, la verko ne estas facile komprenebla.

***Anni kaj Montmartre.** Romano de Raymond Schwartz: Ilustraĵoj de Raymond Laval. 127pp., 2/3. Oni povas malkonsenti kun la aŭtoro pri lingvaj punktoj, oni povas kritiki la bongustecon de tiu aŭ alia aludo, sed neniu povas dubi, ke Schwartz majstras la lingvon. Legante lian verkon, oni sentas la tuŝon de genio. Sed kial li insiste rastadas en la sterko, kiam li povus levi la okulojn al la suno kaj la steloj?

***Se Grenereto . . .** Kenelm Robinson. 160 pp., tole bindita, 6/-. Pri ĉi tiu aro da skizoj kaj rakontoj estas ripetebla pli-malpli ĉio, supre dirita pri "Anni." La aŭtoro kuraĝe provas prezenti en Esperanto dialektajn kaj pensojn knabajn, lokajn, aŭ alimaniere specialajn, sekve malfacile tradukeblajn. Kelkafoje li tre sukcesis. Ofte, tamen, la bildo prezentita tiel koloriĝas aŭ de la psikologia vidpunkto de la aŭtoro mem, aŭ eble de iu aparta sperto lia, ke malgraŭ evidenta sincereco ĝi fariĝas nenormala kaj netipa, almenaŭ rilate vivon anglan.

***Juneco kaj Amo.** Legendo el Venecio, verkita de Edward S. Payson en sia 84-a jaro, 74 pp., 1s. 3p. Tole bindita, 2s. 6p. Pro simpleco de stilo tre konvena por kurso, aŭ por komencanto. Bona libro por donaco.

***Persa Ŝlosilo** de Esperanto. 6p.

***Japana Ŝlosilo** de Esperanto (dua eldono) 2p.

Tricent Jaroj da Historio Bostona. N. W. Frost. 24pp. 1s., ĉe F-ino Mabel Butman, 10 Radsdale Street, Allston, Mass., U.S.A.

La Princo 8-ta Emeriko. 16pp., ilustrita. Verkis D-ro Remigo Bodnar por la Romkatolika Esperanta Kongreso en Vieno, 1930. Prezo ne montrita.

La Mortado. Publika parolado de Prof. D-ro H. Nothnagel, tradukita de Bernhard Selzer. Scienca traktajo pri la naturo de la morto. 27pp., 1 gmk., ĉe Esperanta Societo "Progreso," X, Ettenreichgasse 4/31, Vieno.

Volumenanalizo de Magneziaj Saloj. D-roj T. Maeda kaj R. Syōzi.

La Solvebleco de Kalcio Sulfata en Akvosolvajoj. D-ro Yamamoto. 22 pp. N-roj 243 kaj 244, Vol. 13 de Scientific Papers of the Institute of Physical and Chemical Research, Tokio. La du artikoloj haveblaj ĉe Tutomu Maeda, RIKEN, Hongo-Komagome, Tokio, por unu respondkupono.

***Esperanto por infanoj.** S-ino G. Gladstone Solomon, A.R.D.S. 69pp., 1s. 6p. Simpla legolibro por infanoj, kun multaj kolorigeblaj ilustraĵoj, papero kaj preso bonaj. Tre rekomendinda, kaj la sola libro en Esperanto tiuspeca.

Letero de Bonvolo al la Geknaboj de la Tutmondo. Sendata de Geknaboj de Formoso. Ĉe S-ino S. L. Hibino, Taihobu, Formosa, Japanujo.

Organizo de la Ligo de Nacioj. Murtablo trilingva, montranta la organizon de la Ligo, kun naciaj flagoj. 2s. 3p., ĉe D-ro Teich, Lahnestrasse 7, Saarbrücken 2, Saar Teritorio.

Kompletny Samouczek Języka Esperanto. Lernolibro de Esperanto en Pola lingvo. S. Grenkamp-Kornfeld. Antaŭparolo de Prof. A. Cotton. 72pp., ĉe Eldonejo "Esperantista Voĉo," Jasło Polujo.

***Viktimoj.** Julio Baghy. Dua eldono iom plibonigita kaj pli bele presita de ĉi tiu interesa rakonto. 237pp., 4/-, duon-tole bindita, 4/6, luksa, 6/-.

Religio-filozofia vivkoncepto de Petro Danov. A. Tomov. 27pp. **La Talantoj.** P. Danov. 28pp. Ĉe Atenas Nikolov, str. Car Iv. Ŝisman, Burgas, Bulgariujo.

Vom Kultur- und Bildungswert des Esperanto. D-ro Robert Trögel. Bonega propaganda artikolaro en germana lingvo. 77pp., 2 Rm., ĉe Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Abteilung, Leipzig, Germanujo.

Esploro pri la situacio de la Bretona lingvo en 1928. Internacia Kelta Biblioteko, Vol. 1. 48pp., kun multaj mapoj, en lingvoj Bretona kaj Esperanta. Interesa priskribo de la rezisto de bretona lingvo kontraŭ la influo de la franca. Sv. fr. 0.75, ĉe "Gwalarn," B.P. 75, Brest, Bretonujo, Francujo.

Poemaro el Hungarlando. (Hungaraj Poetoj de la XVI-a jarcento ĝis niaj tagoj). Trad. Francisko Szilagyí. 71 poemoj el 54 aŭtoroj. 96 pp. Prezo ne montrita. Presis Hoffmann kaj K-o, Profeta-utca 7, Budapeŝto.

"**Kaj ĉio restas penso, sed ne faro.**" Pri interkompreno kaj homara frateco. Verkis Lakshmiswar Sinhar. 15pp. Prezo ne montrita. Ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm.

***La Junulino el Stormyr.** Novelo de Selma Lagerlöf. El la sveda tradukis O. Frode. 94pp., Interesa kaj rekomendinda.

XI-a Foiro de Reichenberg, 16-22 Aŭgusto, 1930. Ni ricevis diversgrandajn afiŝojn, ankaŭ glumarkojn, pri ĉi tiu grava foiro.

Books starred are stocked by the B.E.A. Postage extra. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

BIBLIOTEKO DE B.E.A.

Koran dankon al F-ino Adams, S-ro Clayton, S-ro K. R. C. Sturmer, S-ino Ellicott, kaj Anonimulo, pro donaco de materialo aŭ de mono.

The British Esperanto Association (Inc.),
142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C. 1.

Official Notices.

NEW AFFILIATED GROUP.

Hull ("Verda Stelo"). Sekretario: H. B. Franks, 48 Worthing Street. Kunvenoj ĉe 89a Grafton Street, merkrede, 8.0.

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

Harry ARNOLD, 15 Warwick Street, Oxford. Winifred A. BAILEY, (Jnr.), 236 Nether Street, London, N.3. Harold J. BROWN, (Jnr.), Friends' School, Sibford, Nr. Banbury. B. A. FLETCHER, Geisil, Holt, Norfolk. S-ino F. GEORGE, 15 Fernshaw Road, London, S.W. 10. R. W. M. GIBBS, Ava House, 34 St. Michael's Street, Oxford. Nan GORDON, 19 Droverhall Avenue, Mossgreen, Crossgates, Fife. A. HILL, 13 Stanhope Road, Queens Park, Northampton. William D. JOHNSTON, 33 Milliken Drive, Kilbarchan. George MELL, 3 Banklands Road, Darlington. James V. MIDGLEY, 13 Parkcliffe Road, Undercliffe, Bradford. S-ino Mary PYETT, West View, Marston Rd., Stafford. Herbert S. SAEKELD, 91 Burnt Ash Road, London, S.E.12. F. SONS, 13 Camberwell Grove, S.E.5. Francis B. WEBSTER, High Ellington, Masham. Thomas WRIGHT, The Bungalow, Norfolk Road, Turvey. F-ino A. BATCHELOR, Soberton House, Nr. Droxford, Hants. F-ino A. M. BEARDER, 29 Spencer Road, Wandsworth Common, S.W.18. F-ino M. KAYE, 465 Leeds Road, Huddersfield.

DONATIONS TO B.E.A., June, 1930.

C. S. Taylor, £5 : 14 : 8 ; F. Hammond, 1/-.

B.E.A. GUARANTORS, 1930.

	£	s.	d.
Previous Total (adjusted) ...	401	14	0
Chubb, A. S., London ...	1	0	0
Dillisen, J. T., London ...	5	0	0
Evans, Lewis, Cefn Coed ...	10	0	
Fomison, S. H., South Shields ...	10	0	
Howlett, Miss A. B., Bushey ...	1	0	0
Hubert, E. B., London ...	10	0	
Maugham, J., Sheffield ...	5	0	
Sturge, Miss S. M., Birmingham...	1	0	0
Williams, Miss A., Ross-on-Wye...	5	0	
Total (Wanted: £500)	£406	19	0

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*Marguerite E. Moss, *Alan H. Smith, *Southsea*; *E. Long, *Gosport*; Mabel F. Meader, William H. J. Bow, *Portsmouth*; Mrs. L. Maddock, Maud A. Marlow, Herbert J. Davey, *Albert M. Macquarie, *Horace S. Ward, *Mrs. Elizabeth Mason, George E. Lambert, Douglas Weston, *London*; *Cyril G. Turner, *Little Sutton*; James E. Melville, Robert Wilson, Stanley Cullis, Alan Whittaker, *Ellesmere Port*; Marion M. Smith, *Trimley*; Laura G. Frost, *Ipswich*; Bert S. Schofield, *Bury*.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

Frederica Smith, *Sydney*; A. G. F. Winter, *Concord, N.S. Wales*; Sydney R. Worrall, *Abbotsford, N.S. Wales*.

*Denotes that candidate has passed with distinction.

Sewell, Presisto, Deal

